

Rio Esperantista

Oficiala Organo de Asocio Esperantista de Rio de Janeiro

PENSO KAJ LABORO POR LA UNIVERSALA FRATECO

DIREKTORO: NELSON PEREIRA DE SOUZA

ĈEFREDAKTORO: LASZLO ZINNER

JARABONO

BRAZILLO — Cr\$ 20,00
Eksterlande — U\$§ 1,50
Aŭ 15 Respondokuponoj
Ekzemplero — Cr\$ 2,00

RIO DE JANEIRO, JANUARO, 1948

JARO II

Monata eldono

N.º 10

Adreso: Caixa Postal 3677

Redakcio kaj Administrejo
Rua das Marrecas, 19, 2.º and
Telefona 22-5300

ANO NOVO!

Um ano novo é sempre promissor. Novos planos e novas realizações.

Em nossa Associação, o ano começa com uma festa de confraternização e a posse de nova Diretoria. Embora constituída dos mesmos elementos que trabalharam no ano passado, houve, êste ano, modificações em alguns cargos. Por isto, estão todos os diretores cheios de novo entusiasmo e dedicação.

Um orçamento está sendo elaborado; a fim de apurar desde já o "deficit" do corrente ano. Isto porque a Associação, não sendo uma empresa comercial, destinada a apresentar lucros, emprega sempre as suas disponibilidades. Depois de feito o orçamento, será organizada uma campanha financeira, a fim de cobrir o "deficit", porque a renda normal da A.E.R.J., como sejam: cotas de associados, venda de livros, cursos, etc., não bastam para as despesas obrigatórias de sede, propaganda, festas, etc. Contamos, portanto, com o apóio de nossos associados para a "campanha financeira de 1948".

Grande é, também, a febre de trabalho dos dirigentes e redatores do nosso jornal. Foram feitas algumas modificações, por motivo do pedido de demissão, em dezembro passado, do diretor responsável, por questões privadas. Esperamos melhorá-lo ainda mais, porque já contamos com a colaboração eficiente de samideanos de outros países.

Muito se trabalha em nossa sede. O movimento espe-

rantista é essencialmente prático e exige uma dedicação e atividade invulgares de seus dirigentes. Todos fazem o máximo que podem, porque a vida da Associação não pode parar. São necessários cursos seguidos para principiantes, porque as nossas fileiras precisam de ser engrossadas. Terminados êstes cursos, os novos esperantistas precisam de se aperfeiçoar, e temos de manter constantemente um curso de aperfeiçoamento. Precisamos de professores, para aumentar o número de cursos; a propaganda não pode diminuir e nela todos colaboram, aproveitando todas as oportunidades. Os esperantistas também precisam de distração, mesmo os dirigentes, que trabalham durante tóda a semana, pelo Esperanto, e a Associação mantém programas como a "kulturkunveno", excursões, etc. Nessas reuniões e festas os diretores trabalham muito, mas também se distraem. E ficam muito satisfeitos, quando as suas realizações são coroadas de êxito, pelo apóio dos associados. Todo membro da Associação deve, pois, prestigiá-la e colaborar para o seu engrandecimento, participando de suas realizações e dando suas sugestões.

ESPERANTISTA!

OUÇA TODOS OS SABADOS, DAS 17 AS 17,30 HORAS, EM 49.75 METROS (6.000 QUILOCYCLOS), O PROGRAMA ESPERANTISTA DA "RADIO INCONFIDENCIA", DE BELO HORIZONTE!

APÊLO

Aos "gesamideanoj" de todo o Brasil saúdo fraternalmente e faço fervoroso apêlo, no sentido de que cada um contribúa — ainda mesmo com a mais reduzida importância, peça de roupa usada, novêlos de lã (para confecção de agasalhos) ou alimentos (café matê, açúcar, leite em pó, chocolate, etc.) — para auxiliar nossos "gesamideanoj" da Europa, que atravessam terrível crise, agravada dia a dia com o rigoroso inverno europeu.

Inúmeras cartas recebidas continuamente atestam a sua angustiosa e desesperadora situação.

"Gesamideanoj"! Lembremo-nos da grandiosidade do Ideal que o Esperanto encerra, e vivamos êsse Ideal, não pela intenção mas pela ação, e façamos do Esperanto não apenas um regalo para nosso espírito, um motivo de alegria pessoal e restrito, mas sirvamo-nos dêle como *Agente* vivo da Fraternidade, para levar além fronteiras, nesta hora de sofrimento e tremendas apreensões, não os nossos votos cordiais de "Boas-Festas" — muito expressivos nos tempos normais — porém, o nosso socorro material, a nossa palavra confortadora e fraterna, que será para êles Vida e Esperança!

Convoco, pois, todos os esperantistas e simpatizantes do Esperanto, as Associações e Clubes esperantistas no Brasil, todos para, num trabalho em conjunto, rápido e eficiente, realizarmos uma campanha de assistência aos esperantistas europeus necessitados, campanha que denomino, em homenagem ao nosso Majstro, cuja data de aniversário neste mês se comemora: *Campanha Zamenhof*.

NOTA: — Os donativos devem ser enviados ao Sr. Braz Cosenza, Secretário Geral da Associação Esperantista do Rio de Janeiro — Caixa Postal, 3.677 — Rio de Janeiro.

Rio de Janeiro, 15 de dezembro de 1947. — *Yolanda de Araújo Costa* — (Membro da "Liga Esperantista Brasileira" e da "Associação Esperantista do Rio de Janeiro").

NOVAJ REDAKTOROJ DE RIO ESPERANTISTA

Pro la abdiko de nia direktoro S-ano Nelson Pereira de Souza, oni ree decidis pri la kunlaborantoj de la gazeto. Pri nova direktoro ankoraŭ oni ne decidis. Ĉefredaktoro restas S-ano Zinner al kiŭ oni devas sendi ĉiun kunlaboraĵon. La nova administranto estas S-ano Doblas Filho, al kiŭ rilatas ĉiuspecaj aferoj pri abonoj, reklamoj kaj monaj aferoj de la gazeto.

La nova redaktoro pri lingvo-korektado estas S-ano Konstanteno Blasĉikov. D-ro Braz Cosenza restas kiel redaktoro. Ankaŭ iĝis redaktoro S-ano Wilton Ribeiro.

LA EVOLUO DE L' ĈIELKORPOJ

S-ano Alberto Bonfim ricevis leteron de s-ano C. Joon, el Schagen, Nederlando, disĉiplo de la famkonata filozofo Börger, pri la evoluo de l' ĉielkorpoj. S-ro C. Joon tradukis diversajn verkojn pri filozofio en Esperanto. S-ano Bonfim petis al la estraro de "RIO ESPERANTISTA" publikigi sub tiu ĉi titolo la tekstoj de la letero, celante vidigi al la kontraŭuloj de Esperanto, ke la Zamenhof lingvo estas eble la plej taŭga por praktiki sciencajn temojn.

"Se oni deziras akcepti la tezon, ke la Tero estiĝis el la Suno, ni ankoraŭ ne estas pretaj, ĉar tiukaze la demando pri estiĝo de la Tero forŝoviĝas antaŭ la demando: Kiel estiĝis la Suno?"

Ni povas vidi la evoluon de la ĉielkorpoj en la universo. Oni konstatis, ke la evoluo okazas ĵu pli rapide des malpli granda la ĉielkopro estas. Tiel ni povas diri, ke Marso, nia fama planedo-kunulo, pli malgranda ol la Tero, pli evoluis ol nia planedo. Ĝi aspektas iom ruĝa, ĝi oksidiĝis, ĝiaj montoj verterdifektigis: ĝi estas morta. Sur ĝi la temperaturo estas tre alta, la kvanto da aero (atmosfera) treege malgranda por supozi vivon sur ĝi. La vivo ja dependas de certaj kondiĉoj. Marso, do, montriĝas al ni tia kia poste estiĝos nia Tero: rustkolora, senviva.

Jupitero, grandega, do ankoraŭ ĵuna, montras, ekzemple, frenezan rapidecon. Nia malĵuna Tero jam trankviliĝis!

Saturno, iom pli malgranda, ankoraŭ rapidi (sur ĝi l tago daŭras 10 ¼ horojn) sin trovas tute sub nuboj de amoniako kaj metano. Sur ĝi la vivo estas tre malprobabla. Ĝia atmosfero estas proksimume 25.000 kilometrojn dika. La sunlumo praktike neniam atingas ĝian surfacon kiu estas kovrita de glacitavolo 10.000 kilometrojn dika. Tie la vivo ne estas ebla.

Pluto, la plej freŝdate eltrovita, tre malproksima de la Suno, estas glacie malvarmega. Sur ĝi ne estas eblaj gaso nek vivo. Sed ni revenu al niaj ideoj pri estiĝo.

En 1937 oni eltrovis la tiel nomatan "nigran stelon". Grandega, terure maldensa, ĝin trairante oni spertus neniom da rezisto. Tiaj steloj estas la fantomoj de la universo.

La komenco de la lumo povas esti nur mallumo; se ĝi jam es-

tas lumo, tio ja ne estus komenco. Kaj la nigra, nevidebla stelo devas, sekve, esti la komenco. De kie ĝi venis, ni ne povas diri.

En la universo ne estas firmaj lokoj. Ĉio estas moviĝanta. Ni komprenu, ke la universo ne estas ia absoluta vakuo. Krome ni sciu, ke oni (la fizikistoj sa-



me kiel diversaj filozofoj) jam ekhavis la konvinkon, ke la materio estas, fakte, nemateria; ĝi estas nur kuntiriĝo de la forto.

Ankaŭ la steloj estas, do, kuntiriĝo de la forto, buliĝo de la forto, mi preferus diri. Ju pli ili kuntiriĝo des pli krestas la lumforto. En tiu kuntiriĝo efikas du kontraŭaj fortoj: La kuntiriĝo (altiro) rezultiĝas je premo. Tiu premo kaŭzas (= estas) varmecon. La varmecon kaŭzas, pli ĝuste estas, difuzon (depuŝo).

En la Universo ne povas regi nur la kuntiriĝo, la altira forto, ĉar tiukaze ĉio fariĝus unu nura densa maso. Absolutaj unuflankajoj ne estas eblaj. Tial ankaŭ estu la depuŝa forto.

La kunagado de tiuj du fortoj rezultiĝas je ekvilibro kiu montriĝas en la senripoza turniĝado de unu ĉielkorpo ĉirkaŭ la alia. Ni, do, vidis naskiĝon de la stelo. Ĝi daŭre kuntiriĝas, pli varmegiĝas, dissendas sian energion. Tiu energio iam elĉerpiĝos. Kiam tio okazos, ĝi estingiĝos.

La astronomiistoj diras, ke ili ne scias kio poste okazos; ili tion ne povas vidi. Tamen estas indiko. Ni ja konas la kometojn. Ili estas "transira" stadio de stelo al planedo. Ili mem montras tion ĉar ili fuĝas for de la lumo, serĉas sian estontecon, la staton de planedo.

En proksimeco de la Suno la kometo povas preteriri kun la voŝto antaŭen, la voŝto konsistas el ege maldensa materio

(foje eĉ pli maldensa ol de ni, homoj, farita vakuo - aermalpleno). La astronomiistoj kelkfoje diras, ke tiu voŝto estas forpremata de la sunradioj. Kiamaniere? Ĉu tiuj radioj estas, do, materiaj?

Ekzistas du hipotezoj pri la karaktero de la lumo. Unu diras — estas tremetantaj lumpartetoj (do io materia); alia diras — estas nur tremetado.

Kaj laŭ tio kion ni diris supre la materio, ĝi nur povas esti nemateria. Lumo estas abstrakta materio aŭ materia abstrakteco. Ĝi antaŭeniras la materion. La astronomiistoj eĉ diras, ke en la kerno de la Suno, ekzemple, pro premejo kaj varmejo, la materio disfalas, dispeciĝas. Tie jam ne estas atomoj. Kontraŭe, ni povas diri, ke ankaŭ la materio povas estiĝi en la varmejo kaj tio bone konvenas al nia rezonado pri la estiĝo de la planedoj ktp.

En la suna kerno la materio ne disfalis sed devas formiĝi ankoraŭ. Atomojn, tiajn kiajn ni konas sur nia Tero, ni nur trovas ĉe la surfaco de la Suno.

Krome ni komprenu, ke laŭ tio kion ni diris antaŭ, la Suno estas, principe, senlima forto-kampo. Ankaŭ ĝi iam estingiĝos. Tiam, kiam ĝi venos en proksimeco de iu pli granda suno, povas okazi, ke tiu ĝin "ekkaptos". Tiamaniere nia Suno fariĝos kometo. Same kiel la kometoj de nia sunsistemo ĝi ne plu sin submetos al tiu nova grandegulo; ĝi sovaĝe kaj neregule ekkuros ĉirkaŭ, tiu grandegulo kaj komence eble eĉ ekkavos voŝton forkureman ktp. La juneco ja estas senbrida! Poste ĝi trankviliĝos kaj orde ekiros sian vojon ĉirkaŭ ĝia nova "atrino" kaj nia Tero fariĝos luno ktp.

Tamen ankaŭ estas eble, ke la Suno ne ĝisvivos ĝis tiam; ĝi ja ankoraŭ ne travivis la "nova"-stadion kaj tio signifas, ke ĝi ankaŭ povos eksplodi se en iu momento la streĉo, la polusa streĉo de altiro kaj depuŝo, en sia interno disekvilibrigis.

La astronomiistoj diras, ke tio provizore ne estas probabla. Sed kiu ja povos garantii? En la naturo ĉio estas en la kampo de hazardo. La naturo estas blinda, senspirita, senracia. Kaj nur en pura racio la hazardo estas reduktita al racia faktoro.

C. Joon.

O GOVERNADOR MILTON CAMPOS E O ESPERANTO

Segundo notícias recebidas de Belo Horizonte, do samideano Onésimo Faria, revestiu-se de grande brilho a Primeira Convenção Mineira de Esperanto. O Governador do Estado de Minas Gerais auxiliou econômica e moralmente a Convenção, prestigiando-a inteiramente. Este fato é auspicioso para o movimento esperantista.

Os participantes foram recebidos pessoalmente por S. Excia., no Palácio da Liberdade, que prometeu todo o apoio possível ao XII Congresso Brasileiro de Esperanto, a se realizar naquela capital, no ano vindouro. Em palestra com os esperantistas, S. Excia. mostrou-se bem informado a respeito do movimento esperantista no mundo, bem como dos objetivos da língua auxiliar. A palestra foi muito cordial e todos se sentiram perfeitamente à vontade no Palácio da Liberdade.

O governador mineiro é um autêntico democrata liberal e, por sua atitude, fez com que os convencionais compreendessem perfeitamente que somente num clima verdadeiramente democrático é possível o progresso de um povo pela realização dos mais altos ideais.

Finalmente, todos os esperantistas se retiraram, levando grata recordação do encontro que tiveram com o Sr. Milton Campos, Governador do Estado de Minas Gerais.

ESPERANTO KAJ RADIO

La advokato S-ino Ilka Duque Estrada faris paroladon pri Zamenhof je la 15a. de Decembro 1947 antaŭ la mikrofono de PRA-2. — Radistacio de la Ministro pri Edukado kaj Saneco Poste S-ano Delio Pereira de Souza deklamis la lastan strofon de "Preĝo sub la verda standardo" de Zamenhof. La tekston de la salut-parolado farita de S-ino Ilka ni aperigos la proksiman fojon.

LA VIVO AL MI VENIS

EL LA ĈEĤA LINGVO

Josef Sládek (1845a — 1912a j.)

*La vivo al mi venis,
anĝelo ridetanta,
pokalon plenan tenis
da bona vin' ardanta.
"Jen fort', feliĉo", diris ĝi,
"en ĉiu tiu guto;
junulo, trinku do!" Kaj mi
tuj trinkis, sen disputo.*

*La vivo al mi venis,
figur' de palfantomo,
amaran tason tenis
kaj diris: "Trinku, homo,
la galajn gutojn de dolor",
konsaĝon de l' homraso;
suferi lernu via kor'."
Mi trinkis el la taso.*

*La vivo al mi venis
enflug' de l' rememoro;
ĝi velkan floron tenis
kaj larmojn sur la floro.
La velkan floron prenis mi
kaj kisis kun kor-skuo;
la larmojn sorbis mi el ĝi,
verŝitajn dun viv-bruo.*

(Esperantigis Francisko V. Lorenz)

RECENZO

Ni ĵus ricevis kaj legis 23-paĝan kajeron, eldonita de Portugala Eldona Rondo, en Porto, verkita de profesoro Agostinho da Silva kaj tradukita de s-ano José de Freitas Martins, el la serio "Enkonduko en la Kulturon", sub la titolo "La Budhismo".

Temas pri mallongitaj biografio kaj doktrino de Budao kaj oni povas laŭdi la aŭtoron ĉar li lerte scipovis prezenti en tiu verketo ĉefajn trajtojn de la doktrino ĝis nun praktikata de granda parto de la homaro. La verketo trafte priskribas la naskiĝon de la doktrino, ĝian evoluon, ŝanĝojn de ĝi suferitaj tra la jarcentoj ĝis la nuna stato kaj moderna koncepto pri ĝi. Notindaj estas tiuj pecoj de la verketo kiuj pritraktas vidpunktojn budismajn kaj kiujn la leganto vole-nevole opinias tre similaj al kelkaj aspektoj de la moderna spiritisma doktrino.

Al la tradukinto prezentiĝis kelke da malfacilaĵoj kiujn li ne ĉiam sukcesis forigi. Inter tiuj "mankoj" ni citu la skribmanieron de la titolo mem. Laŭ Plena Vortaro, la radiko de la vorto estas "Budao", sekve; "budisto" kaj "budismo". Oni, do, ne havas aŭtoritaton skribi "budhismo" anstataŭ "budismo" kiel faris la tradukinto. Plue: la unua skribmaniero eĉ malhelpas la elparoladon de la vorto kaj igas ĝin malbelsona, laŭ nia opinio. Alia "manko" konsistas en uzado de la supersigno sur la litero a en la vorto "nirvana" kaj de la subsigno en vorto "Aĉoku" kio certe okazigos ĉe samideanoj kiuj ne scias portugalan lingvon konfuzon kaj eble eĉ miskomprenon dum la legado.

Fine, malgraŭ tiuj "mankoj" la kajero estas vere leginda eĉ legenda kaj al ĉiu kiu interesiĝas pri filozofiaj demandoj, ne posedante sufiĉe da tempo por sin dediĉi al la studado de tiu scienco, ni serioze konsilas ĝin legi.

LEGENDO PRI LA MIGDAL-ARBOJ

ALGARVA FOLKLORO

El ĉio, precipe el naturaj fenomenoj, el la pejzaĝo kaj el la Historio, la popola animo kreas belajn poetikajn legendojn kaj fabelojn kiuj montras la fantazian kaj neelĉerpeblan imagopovon de la simpluloj.

El la multnombraj legendoj kreitaj de la algarva popolo mi volas nun rakonti pri tiu, kiu rilatas al la displantado de migdalarboj sur la grundo de tiu lando.

Por bone komprenigi la rakonton mi devas ĉi tie klarigi, ke en la tempo kiam la mahometanaj gentoj regis Hispanan Duoninsulon, Algarve estis reĝlando kies ĉefurbo estis Chelb, Silves de la portugaloj, tiuepoke unu el la plej gravaj urboj en Eŭropo.

Oni rakontas, ke unu el la unuaj maŭraj reĝoj de tiu reĝlando ricevis en sia kastelo, kiel sklavinon, principon ŝtelitan de la maŭraj korsaroj. Tiu principino estis tiel bela kaj tiel milda; ŝia vizaĝo, enkadrigita per blondaj kvazaŭ orumitaj haroj, estis tiel afabla; ŝiaj bluj okuloj rigardis tiel dolĉe kaj kareseme; ŝia haŭto etis tiel rozkolora, ŝiaj piedoj tiel malgrandaj, ŝiaj manoj tiel delikataj, ŝia talio tiel gracia, ŝia aspekto tiel nobla kaj la freŝeco de ŝia juneco tiel alloga, ke la reĝo, tuj kiam li ekvidis ŝin, restis pli ol enamigata, vere ensorĉata. Tamen, post la unua tre agrabla impresio pri la beleco de la principino, la reĝo notis, ke malgraŭ liaj bonaj paroloj kaj ĝentilamaj karesoj, la sklavinino montris ĉagrenitan mienon kaj eĉ ne ridetis por lin komplezi.

La reĝo, pli kaj pli enamigata de la sklavinino, faris ĉion por plaĉi al ŝi kaj, pasie kisuante ŝiajn delikatajn manetojn, ŝin demandis:

— Kiel vi nomiĝas, reĝino de mia koro?

— Gilda estas mia baptonomo, Sinjoro! respondis la sklavinino.

— Ĉu vi volas doni al mi la honoron fariĝi mia edzino kaj esti dum la vivo mia plej bona amikino?

— Mi ja estas via sklavinino, Sinjoro, agu koncerne min laŭ

via plaĉo, sed ne ŝercu, Sinjoro, ne ŝercu, mi vin petas!

Tiel dolĉege ŝi parolis kaj tiel ĉagrenita estis ŝia mieno, ke la reĝo ne povis plu sin regi kaj senpripense li falis surgenuen antaŭ la belulino; per la frunto li tuŝis tri fojojn la plankon, metis la maldekstran manon sur la koron, levis la dekstran kaj diris:

— Aŭskultu min Gilda, kaj poste diru ĉu mi ŝercas! Je la sankta nomo de Allaho, la nura vera Dio, mi ĵuras, ke mi vin amas kaj ĉiam vin amos kaj mi estu mia animo perdita kaj mia korpo disŝirita de ŝakaloj se mi ne restos fidela al vi dum mia tuta vivo! Ĉu vi nun kredas al mi, Gilda?

— Jes, Sinjoro, mi kredas al vi kaj mi nur deziras fariĝi via amata kaj amanta edzino!

Tuj poste eksonis trumpetoj, festojn sekvis festoj. La bela Gilda ricevis milojn da riĉegajn donacojn, ĉiuj honorigadis ŝin. La reĝo estis pli kaj pli enamigata de ŝi. Fine okazis la geedziĝo. Pasis tagoj kaj tagoj, sed la ĉagreno ne forlasis Gilda'n.

Tiam la reĝo, jam terurigita, demandis ŝin pri la kialo de tia ĉagreno kaj la bela reĝino, verŝante abundajn larmojn, respondis al li:

— Mia tre amata edzo kaj sinjoro, pardonu min, mi petas! Mi ja scias, ke vi ne povas liveri kuracilon kontraŭ mia malĝojo! Mi estas nordlandanino kaj mi ne plu vidas nek vidas la karan neĝon kiu tiom plaĉas al mi! Jes, mia amato, vi ne povas prezenti antaŭ miaj okuloj panoramon simila al tiu, kiun en mia patrolando ĉiuvintre mi ĝuis!

Meditinte kelkajn momentojn, la reĝo ekkriis:

— Ho, jes! mi ja ne havas tian povon, sed Allaho estas granda kaj ĉiopova kaj mi estas Lia fidela servisto! Mi preĝos Allaho'n pri tio! Trankviliĝu, karulino mia, miraklo estos farita!

Dume li ordonis al ĉiuj siaj vasaloj la displantadon de migdalarboj tra la tuta regno.

Pasis dek-du monatoj, sed la dezirata neĝo ne aperis. Pli dek-du monatoj pasis, sed la ĉagreno de la reĝino ne pasis.

Tun matenon de januaro la reĝo invitis belan Gilda'n supreniri kune kun li la ŝtuparon de la honorturo de lia kastelo. Kiam ili alvenis al la supro de la turo la reĝino falis, duonsvenita, sur la brakojn de sia edzo kaj ekplo-

(daŭrigo je la 6.^a paĝo)

ESPERANTO ĈE BRAZILA SPIRITISMA FEDERACIO

LA NOVAJ DIPLOMITOJ

Dimanĉon, 23an de Novembro, okazis en la kunveno ejo de Brazila Spiritisma Federacio, Av. Passos, 30, la disdono de "atestoj pri lernado" al dek-unu novaj geesperantistoj. La estraro de B.S.F., kiu estas granda kaj tutlanda influhava organizo, kies gravaj servoj al Esperanto jam estas tutmonde konataj, bonvolis solenigi tiun okazon per speciala kunveno.

Preparcele, la antaŭan dimanĉon, 16an, nia eminenta samideano d-ro Porto Carreiro Netto faris portu gallingve belegan paroladon pri "Esperanto kaj Spiritismo", kiu estos baldaŭ presita sur la oficiala organo de B.L.E. Ĝi estas unu el la plej kompletaj tezoj iam verkitaĵoj pri tiu temo.

La kunvenon de la 23a de Novembro prezidis d-ro Sylvio de Brito Soares. Ĉe la estrartablo sidis, krom la prezidanto, ankaŭ p-ro Ismael Gomes Braga kaj s-ro Aldino de Freitas, gvidinto de la kurso.

La prezidanto persone disdonis la atestojn al la jenaj gelernintoj: s-inoj Albertina Freire de Matos kaj Marietta de Gusmão Lopes; f-inoj Bella Kestenberg, Adelina da Costa Gomes kaj Aucélia de Oliveira Mello; s-roj Olimpio Lira, Mozart Pereira, Paulo de Oliveira Ludka, Allyrio da Silva Lopes, Zeus Wantuil kaj Henerik Kocher. Tiuj-ĉi du lastaj ricevis ankaŭ kiel premion por kursvizitado du belegajn librojn donacitajn de Prof-ro Ismael Gomes Braga.

La gelernintoj Aucélia de Oliveira Mello kaj Paulo de Oliveira Ludka laŭlegis belajn paroladetojn pri la soleno. Parolis ankaŭ Prof-ro Ismael Gomes Braga, kies jam konata simpla stilo tre plaĉis al la kunvenantoj kaj s-ro Aldino de Freitas.

S-ro Henrik Kocher gvidos elementan kurson por la estraro de Brazila Spiritisma Federacio, kaj s-ro Paulo de Oliveira Ludka direktos la publikan elementan kurson. Faris belegajn paroladojn s-ano José Cosenza kaj s-ino Cedilha Netto. Jen la teksto de la parolado de ĉi lasta:

Ni estas en plena XX jarcento!

Gloraj jarcentoj!

En ĉi tiuj lastaj tempoj fariĝis vere nerezistebla la tutmonda sceno.

Preskaŭ ĉiuj homoj sentas senmezuran soifon je libereco kaj justeco, nesubmeteblan deziregon je renoviga detruado!...

Estas transira nia epoko. La estinto, malgraŭ tio, ke ĝi ne estas ankoraŭ rezigninta pri sia morto, humiligas, ekblindigita antaŭ la nekontraŭstarebla beleco de la brila estonta socio.

Diversaj politikaj partioj abomeninde luktadas inter si, ĉiuj volante altrudi siajn postulatojn, eĉ se, por tio, estos necesa la oferado de milionoj da vivoj!...

La terura fantomo, kiu estas la agonianta kapitalismo, denove minacas la tutmondan pacon!

Sed, sendube, ni jam malproksimiĝis de tiu aflikta historia eknoktigo, kaj ni staras nun, antaŭ la ektagiĝo de nova epoko, kie regos la vera sociala justeco.

En ĉi tiu senco, kun mia koro plena je ĝojo, mi volas me-

morigi, tie ĉi, la saĝan opinion de unu el la ĉefrepresentantoj de la spiritisma movado en Brazilo, deputito Campos Vergal, kiam li opiniis pri la granda kaj lasta politika okazintaĵo, respondante al enketo de "Jurnalo de Debatoj".

"La rompo de la diplomaciaj rilatoj inter nia patrujo kaj Rusujo estas realigita fakto. Tia okazaĵo efektiviĝis, pro tio, ke cirkonstancoj, radikitaj en la estinteco, venis supren. Estis neevitebla. Ni voĉdonis, aprobante la konduton de la brazila registaro. Ne povus esti aliamaniere. Ni faris tion kun malĝojo, ĉar ni sincere deziregas la alproksimiĝon inter la popoloj, kaj ne ilian disiĝon. Ni estas favoraj al nova mondo, al nova civilizacio, en kiu la homoj estu abeloj en komuna abelujo, kaj ne, kiel en la pasinto "homo lupo de la homo". Ni bezonas, en la mondo, novan menson, vere kleran, renovigitan, kiu meti tiun dantan monstron, kiu estas la milito, for de la leĝo kaj de la homeco.

Mi ne estas, kaj neniam estis, pesimisto; mi kredas, ke ni estas ĉe la prologoj de nova mondo; ni laboru kun fido, kun persisteco, kaj ni konstruos novan kaj belan civilizacion, sub kies suno ĉiuj popoloj estos liberaj kaj feliĉaj, kiel loĝantoj de urboj de unu granda kaj unika patrujo: la Homaro".

La sento de frateco entenata en tiuj vortoj, kontrastante kun la malnobla militemo de aliaj reprezentantoj en la deputitejoj, konsistigas la lastan gloron de la spiritisma filozofio.

Kaj, samtempe ke tiun deziregon de frateco oni eksentas en la politika kampo, aliflanke, en la religia sektoro, la fanatikeco cedas iokon al la plej promesanta toleremo.

Kristanismo estas returnanta al sia primitiva pureco, kaj sin prezentas al ni bela kaj simpla kiel estis instruata de Jesuo al la fiŝkaptistoj el Galileo.

Ni sentas, finfine, tiun veron, tiom malnova kiom nia civilizacio, vero kiu estis instruata al ni, ekde la plej malproksimaj tempoj, de la antikvaj iniciatintoj.

Jen ĝi en malmultaj vortoj:

Ni ĉiuj estas animoj grimpantaj, serĉante la Infiniton. En la senfina suprenirado, celante la Perfektecon, ni estas frataj animoj, ĉar ni havis saman originon kaj marŝadas al unu sama celo. La diferenco, kiun ni rimarkas inter unuj kaj aliaj, estas diferenco nur de evolucia grado. Ĉar estas tre longa la vojo celita sur la dorso de la scio-monto, ĉiu el ni troviĝas en difinita loko, en la eterna suprenirado...

Ekzistas, do, nenia substancia diferenco inter la homoj.

Jesuo, volante detruiri enradikitajn superstiĉojn religiajn, politikajn kaj rasajn, rezervis por la Samarianino unu el siaj plej belaj dialogoj kiu finiĝas jene:

— "Sinjoro, miaj patroj adoradis sur ĉi tiu monto, kaj vi diras, ke en Jerusalemo estas la loko, kie oni devas adori. Jesuo diris al ŝi:

— "Kredu al mi, virino: venas la horo, kiam nek sur ĉi tiu monto, nek en Jerusalemo, vi adoras la Patron. Venas la horo, kaj jam estas, kiam la veraj adorantoj adoras la Patron laŭ spirito kaj vero".

Laŭ mia opinio, la plej bona komentario pri ĉi tiu teksto estis farita de Ernesto Renan. Jen, ĝi estas:

"En la tago, kiam Jesuo diris tiujn ĉi vortojn, li estis ververe filo de Dio. Li elparolis je la unua fojo la sentencon sur kiu baziĝas la konstruaĵo de la eterna religio. Li fondis la puran kulton, sen dato, sen patrujo, la kulto, kiun ĉiuj noblaj animoj devos eterne celebri. Lia religio, en tiu tago, estis ne nur la bona religio de la homaro, sed ĝi estis la absoluta religio:

Comprar bem Camisas, Robes, vestons e Pijamas

SO' NO

O CAMIZEIRO



kaj se ekzistas en aliaj planedoj loĝantoj dotitaj per racio kaj moraleco, sia religio ne povas esti malsama de tiu, kiun Jesuo proklamis ĉe bordo de la puto de Jacobo. La homo ne povis ankoraŭ sekvi ĝin, ĉar neniu atingas la idealon, escepte dum mallonga momento. La parolo de Jesuo estis fulmo en nigra nokto. Estis necese, ke forpasis mil okcent jaroj por ke la okuloj de la homaro (de la homaro, ne; de parto treege malgranda el la homaro) povus alĉutimiĝi al ĝia brilego. Sed tiu fulmo iam estos hela tago, kaj kiam la homaro estos trairinta ĉiujn erarajn vojojn ĝi returnos al tiu parolo, kiel nemortema esprimo de sia kredo kaj de siaj esperoj”.

Ni estas travivantaj epokon de hezitemo kaj de doloroj kolektivaj, sed ankaŭ de rapidega progreso intelekta kaj scienca.

Estas necese nun, ke la homo plialtigu sian moralan nivelon ĝis la alteco de sia scienca progreso.

Ĉi tiu, estas la granda problemo kies solvo postulas la plimulton el nia atento.

Urgas, ke tiu subluma averto, “amu unuj la aliajn”, ekfloru en niaj koroj, per fruktoj de ama Sociala Justeco.

Kaj ni, esperantistoj, multon povas fari en la senco de plirapidigi la adventon de la definitiva paco inter la popoloj. Ni estas la portantoj de la plej efika ilo por faciligi la tutmondan fratecon, Ĉiu estas la neŭtrala lingvo internacia.

La alproksimiĝo okazigas la interkompreniĝon, kaj la interkompreniĝo naskas la amon.

Per Esperanto, ni povas persone konstati, ke la sama kunigo de bonaj kaj malbonaj sentemoj kiuj vibras en ni, agitas ankaŭ, en ĉiuj ĝiaj nuancoj, la animon de l' hebreo, kristano aŭ mahometano; ruso aŭ amerikano, afrikano aŭ aziano.

Kaj nenio konvinkas nin tiom, kiom la propra sperto.

Ni praktiku, do, la lingvon de la homaro, kiu estas Esperanto. Ni studu ĝin kun vera zorgo, por ke ni povu propagandi ĝin kun efiko kaj bone komprenata entuziasmo.

Ĉi tiu estas la sincera alvoko, kiun mi faras al tiuj, kiuj en la hodiaŭa tago ricevas la ateston pri elementa kurso de Esperanto, same kiel al ĉiuj ni, kiuj estas komençantaj la lernadon de l' lingvo kreita de la genia Zamenhof.

—:—

Jen la parolado de la lernanto Paulo de Oliveira Ludka: Unue, mi esprimas dankon al miaj samideanoj, kiuj elektis min por paroli al vi.

Precipe, mi devas diri, ke nia instruisto, Aldino de Freitas pro sia laboro ĉe ni kaj ĉe esperantistaro, konkeris mian Amikecon kaj Dankemon.

Al la kunfratoj de Brazila Spiritisma Federacio, korajn gratulojn kaŭze de iliaj klopotoj por Esperanto. Dio benu iliajn laborojn!

Mi, humila servanto de nia sankta afero, estos tre ĝoja se miaj vortoj povos fortigi nian fidon je Esperanto. Tial, mi petas al Dio ke mia malgranda parolado atingu koron austataŭ cerbon.

Mi kredas, ke Esperanto venkis, ĉar ĝi signifas, precipe, Fratecon.

Bedaŭrinde, la homaro forgesis Dion kaj la frazon de Jesuo: “Amu vian proksimulon kiel vin mem”.

De longe, la popoloj kredas, ke por akiri la Pacon oni devas prepari sin por la milito. Sed, kion ni vidas en la jaro 1947a? Nur tion: Militon post milito.

Homaro! Si vi volas Pacon, kial vi preparas vin por la milito? Tiu, kiu volas armilojn, estos vundita de armiloj.

Oni povas vidi, ke la homaro malkonas la parolojn de la Evangelio.

Sed, rigardante Esperantujon, kion ni vidas? Ni vidas, ke homoj el ĉiuj landoj, de ĉiuj religioj, sin komprenas, sin amas. La Frateco, la Amikeco kaj la Amo ĝojigas iliajn vivojn. Tio estas vera ĝojo!

La homaro estas blinda, kaj ni, esperantistoj kaj spiritistoj devas batali, unuigi niajn Fortojn por savi ĝin, por ke ĝi amu la Fratecon kaj la Veron.

La nuna tempo estas decida kaj decidiga. Fortoj de la Mal-

bono kontraŭagas Fortojn de la Bono. Tial, mi parolas al vi, precipe al spiritisma junularo.

Ni, junuloj, posedas la estonton. Morgaŭ, ni estos gvidantoj kaj la estaĵo homaro dependos de ni.

Niaj filoj vivados laŭ niaj agoj.

Ni devas daŭrigi la laboron de niaj kondukantoj. Ili faris multe, malgraŭ malfacilaĵoj, kiujn ni ne havas nun. Ni ne povas hontigi ilin!

Ne sufiĉas diri ke Esperanto estas bona afero... Estas necese agi ĉiamaniere por pruvi tion.

Oni devas ne prokrasti.

Helpu ni la esperantistojn! La Spiritistoj esperantistaj ne estas ankoraŭ multnombraj. Ni devas fondi kursojn, klubojn, ĵurnalojn, k.t. p., kaj kuns kun aliaj esperantistoj fari la Universalan Fratecon!

Al miaj karaj gekursanoj mi diras: Finiĝis la kurso, sed nun komenciĝas nia laboro.

Niaj klopodoj, ĉi tie devas pligrandigi.

Se en nia laboro aperos baroj, ni devos memori la vortojn de la Evangelio: “Ho! malfiduloj, kial vi dubis?”

Ni devas ĉiam rigardi la rezultojn, kaj se ni hezitos, ni devos memori, ke Zamenhof laboregis kaj neniam li hezitis.

La vojo estas malfacila, sed ĝi kondukas la homaron al la Paco, al la Frateco, kaj mi pensas, ke tio sufiĉas.

Iom post iom, nia movado pligrandiĝos kaj la rezisto malpligrandiĝos.

La Espero inspiras nin, lumigos nian vojon, kaj ni devas ĉiam preĝi al Dio: Helpu nin por venki la barojn!

ĈE LA FRANCA RADIO

*Ĉiutagaj esperantlingvaj
elsendoj por tutmondo.*

Kun grandega ĝojo, la geesperantistoj el ĉiuj landoj ekscios, ke la oficiala franca radio en Parizo ĵus kreis elsendojn en Esperanto, sur mallongaj ondoj, aŭdeblajn en la tuta mondo. Tiuj radio-disaŭdigoj okazos ĉiutage, ek de la 15-a de decembro, sur 41m.21, dum unu kvaronhoru, de 18h.15 ĝis 18h.30 (laŭ franca horo) aŭ de 17h.15 ĝis 17h.30 (laŭ horsistemo de Greenwich).

Tiun rezulton akiris nia samideano Pierre Delaire, direktoro de Nacia Centro Esperanto-Oficejo, kiu, cetero, jam gvidas esperanto-kurson ĉe la mikrofono de la nacia radio, de la 8-a de januaro 1947.

Tiuj elsendoj estos gvidataj de nia fervora samideano pariza, F-ino Huguette Royer, fondintino de Ligo France-Esperanto, kaj de S-ro Delaire. Ili, ambaŭ, ĉiutage, animos tiujn elsendojn, kiujn partoprenos eminentaj samideanoj, pritraktante ĉiujn temojn.

La devo de ĉiu leganto estas:

- 1) Konatigi tiujn elsendojn la ĉiuj amikoj-esperantistoj;
- 2) Anonci tiun gravan rezulton por Esperanto per la naciilingva gazetaro;
- 3) Tuj skribi, en Esperanto, al “Radiodiffusion française, Emissions espérantistes vers l'étranger, 118, Champs Elysées, Paris 8^e” por danki kaj gratuli.

A. S. REZENDE

— Inĝeniero —

projektoj kaj antaŭkalkuloj por loĝdomoj
luksaj, hoteloj, hospitaloj, lernejoj, kaj
aliaj konstruaĵoj.

Informpetoj en lingvoj portugala, franca,
angla kaj Esperanta

Adreso: Caixa Postal 2917

Rio de Janeiro

Brazilo

TRA LA MONDO

Ĉeĥoslovakujo. — Dua esperanta informilo pri la SOKOL-festoj en Praha dum 1948 ĵus aperis kaj ĝi estas senpage liverata al ĉiu petinto. Postulu samtempe pli detalan ilustritan broŝuron pri Sokol. Adreso: Sokolsky Slet, Praha III, Tyršův dům.

* * *

Aŭstrujo. — La landa Esperanto-Kongreso kiu devis okazi fine de Aŭgosto en KUFSTEIN, Tirolo, devis esti prokrastita pro epidemio de poliomielito (infanparalizo). La dato ankoraŭ ne povis esti fiksita.

* * *

Svedujo. — Ĝis la 1 de novembro 1947 jam aliĝis 202 personoj el 19 diversaj landoj al la Universala Kongreso en Malmö.

* * *

Grekujo. — Kvankam la movado ne estas nuntempe tre forta pro politikaj okazintaĵoj, la greka esperantistaro sukcesis ricevi de la ministro de la publika instruado cirkuleron en kiu li rekomendas Esperanton al la publikaj lernejoj kaj ordonas ĝian laŭlegan instruadon.

* * *

Polujo. — En Gdynia Esperanto estas deviga lernobjekto en la komerca gimnazio.

* * *

Britujo. — Fondiĝis la Brita Esperanta Scienca Asocio kies celo estas okupi sin pri antaŭenigo de Esperanto sur la scienca kaj teknologia kampoj en Britujo. Ĝi ankaŭ celas la restarigon de la Internacia Scienca Asocio Esperantista.

* * *

Finlando. — En la popola altlernejo en Jämsä okazis Esperanto-Kurso kun ĉirkaŭ 200 partoprenantoj. La kurso havis grandan propagandan efikon kaj diversaj Esperanto-Kursoj nun okazas en tiu urbo.

PALACE MÓVEIS

Exposição permanente de Móveis de fino gôsto

P. M. RAWET & CIA. LTDA.

Pc. das Nações 184 — R. Cardoso de Moraes 506-A

Bonsucesso RIO DE JANEIRO Ramos

V. Excia. já pensou em adquirir seu Calçado!

Não o faça sem primeiro fazer uma visita aos nossos mostruários e preços

CASA RAYON

RUA ARQUIAS CORDEIRO, 278

Fone 29-1359 (Meyer)

Sociaj notoj

Dum la kuranta monato festas sian naskigan datrevenon la jenaj asocioj, kiujn ni kore gratulas:

1-an — Lauro Alexandrino Chaves

1-an — Antonio Fernandes Soares

2-an — Margarida S. F. Lopes

3-an — Jaime Monteiro Duarte

3-an — José R. P. de Magalhães

9-an — Oscar de Noronha Filho

11-an — Alcínio Alves Ribeiro

12-an — Carlo Alves de Paiva

14-an — Jaime Borges Araujo

12-an — Alfredo Moreira Agra

15-an — Bento P. da Rosa Filho

17-an — Alvaro Antunes

21-an — José J. Trindade Filho

23-an — Redenta Mariano

26-an — Walter Rodrigues

26-an — Godofredo de Souza Aguiar

KORESPONDADO

ĈEĤOSLOVAKUJO. — Fino Helena Prokyskova deziras korespondi kun junaj brazilanoj p.ĉ.t. USTI NAD LABEM, MASARIKOVA 113.

FRANCUJO. — Fino Georgette Salmon deziras korespondi kun brazilanoj pli ol 27-jaraĝaj p.ĉ.t. ANGERS (Maine et Loire), 6 rue Bodinier.

ANGLUJO. — S-ro Wilfred P. H. Warner deziras korespondi kun brazilaj gesamideanoj pri pac-temoj. MORNAY LODGE, ASH HILL ROAD, T ORQUAY.

GERMANUJO. — S-ano Hermann Klaetsch deziras korespondi kun brazilanoj. (19) (SAALES), ACKERWEG 93.

F A R I G U
S U B T E N A N T O
D E

“RIO ESPERANTISTA”

RIO-ESPERANTISTA
Propriedade da A.E.R.J.
Um jornal do Rio para o mundo

Enderêço: Caixa Postal 3677
Rio de Janeiro — Brasil
Redação e administração:
Rua das Marrecas, 19-2.º
Tel. 22-5300

Diretor responsável
Nelson Pereira de Souza

Gerente

F. Doblas Filho

Redator-chefe

László Zinner

Redatores

Konstantino Blasĉikov

D-ro Braz Cosenza

Wilton Ribeiro

*

EXPEDIENTE:

As importâncias referentes às assinaturas de RIO ESPERANTISTA, deverão vir em nome do nosso gerente, sr. F. Doblas Filho, bem como quaisquer quantias, vales-postais, cheques, etc.

*

La gazeto rajtigas tutan liberon al ĝiaj kunlaborantoj kaj ĝi ne respondecas pro la enmetitaj konceptoj en artikoloj subskribitaj.

Estas permesata la represo de la artikoloj, ĉu parte, ĉu tute — kondiĉe, ke oni citu la fonton.

LEGENDO PRI...

(daurigo de la 3.^a paĝo)

ris. Ŝi ploris, sed ĉi foje pro ĝojo, ĉar la ĉagreno forflugis:

Antaŭ ŝiaj okuloj sin etendis vasta kampo kovrita per blanka mantelo simila al tiu pri kiu ŝi jam de longe sopirĝemadis.

Vorkis Francisco Pedro Candido.
Lisbono, Portugalujo.

DR. ADOLPHO STAERKE
Livre docente da Universidade do Brasil
Clínica de senhoras

Residência: RUA BELA S. LUIZ, 68
Tel. 48-5892

Consultório:

R. ASSEMBLÉIA, 58-1.
Tel. 42-3835

Curso de Esperanto por Correspondência

O Brazila Instituto de Esperanto, do Rio de Janeiro, mantém cursos da língua mundial por meio de correspondência, destinados principalmente àqueles que, por viverem afastados dos centros de cultura, ou por motivo de seus afazeres particulares, não podem frequentar cursos orais. Nos aludidos cursos, que têm caráter permanente, podem inscrever-se quantos o desejarem e onde quer que residam. As lições encontram-se reunidas no "Curso Completo de Esperanto", da autoria do prof. Roberto das Neves, bora em vinte fascículos, impressos e mexcelente papel e fartamente ilustrados, contendo cada uma das lições, cujos temas ou exercícios têm a respectiva solução no fascículo seguinte, de tal modo que permitem um fácilimo, completo e perfeito aprendizado, sem mestre, da língua mundial, num período de três a quatro meses. Até hoje, foram feitos, pelos referidos cursos, mais de dois mil esperantistas em Portugal e no Brasil.

O preço da obra é de Cr\$ 50,00 e a taxa de inscrição nos cursos, de igualmente Cr\$ 50,00, o que totaliza Cr\$ 100,00 (ce mcruzeiros), a pagar de uma só vez.. Contra o recebimento desta importância, remeter-se-ão, sob registro, os 20 fascículos do "Cur-

so Completo de Esperanto" e orientar-se-á o aluno até o fim do seu aprendizado.. No final, os alunos que o desejarem submeterão as suas provas ao exame de um juri designado pelo B.I.E., que concederá diplomas de aproveitamento.

A mesma obra encadernada custa Cr\$ 70,00 o que eleva o total a Cr\$ 120,00.

Estudantes, professores, operários, amadores de rádio, desportistas, filatelistas, cinéfilos, homens de todas as profissões — integrai-vos no espírito universalista da nossa época, aprendendo a língua mundial, o Esperanto, que fará com que deixeis de ser estrangeiros em qualquer parte do globo, permitindo corresponder-vos com todo o mundo e em todo o mundo serdes compreendidos!

Não deixeis escapar o ensejo que vos proporciona o Brazila Instituto de Esperanto com o seu "Curso Completo de Esperanto", o melhor, o mais racional, o mais prático e o mais pedagógico, em língua portuguesa!

Escrevei hoje mesmo, a solicitar a vossa inscrição nos cursos, fazendo acompanhar o vosso pedido da respectiva importância, ao seguinte endereço: Prof.. Roberto das Neves.. Brazila Instituto de Esperanto.. Caixa postal 142. Lapa.. Rio de Janeiro.

PUBLIKIGAJOJ RICEVITAJ

AŬSTRUJA ESPERANTO-REVUO, N-roj 7-11, Vieno, Aŭstrujo.

NEDERLANDA ESPERANTO. N-roj 10 kaj 11, Amsterdam, Nederlando.

FLANDRA ESPERANTISTO, N-ro 10, Bruselo, Belgujo.

RENOVIGO, N-roj 88 kaj 89, Meksikio.

AMÉRICAN ESPERANTIST, N-roj 9-10, Novjorko, Usono.

BULETIM ESPIRITA, N-roj 18 - 19, Florianopolis, Brazilo.

NATURA, N-ro 48, Lisbono, Portugalujo, kun kvarpaĝa esperanto-fako.

MONTARA BULTENO, N-roj 3-6, Belo Horizonte, Brazilo.

SUDA STELO, N-ro 4, Porto Alegre, Brazilo.

REFORMADOR, N-ro 11, Rio de Janeiro, Brazilo.

ESPERANTISTO, N-ro 9, Praha, Ĉeĥoslovakujo.

MALGRANDA REVUO, N-ro 3, Ludvika, Svedujo.

LA FOLIO, N-ro 9, Malmö, Svedujo.

UKRAINA ESPERANTISTO, N-ro 7, Schlisfach, Germanujo (Usona zono).


LABORISTA ESPERANTISTO, N-ro 11, Amsterdam, Nederlando.

SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN, LA ESPERO, N-ro 11, Göteborg, Svedujo.

TRIBUNA ESPIRITA, N-ro 32, São Paulo, Brazilo.

BROSUROJ pri la 32-a Unversala Kongreso de Esperanto de 31-7 ĝis 7-8 de 1948, Malmö, Svedujo.

Estrela de Cordoba



O reporter de RIO ESPERANTISTA conseguiu entrevistar a artista mexicana — Estrela de Córdoba, durante a festa de arte realizada, em honra ao insigne criador do ESPERANTO, Sr. Dr. L. L. Zamenhof, no dia 13 de dezembro último, na Associação Cristã de Moços do Rio de Janeiro e, graças a esse esforço os numerosos leitores podem conhecer um pouco da vida dessa esperantista que, naquele seu recital foi acompanhada ao piano pelo maestro sr. prof. Alberto Bernabé, filho do famoso e de saudosa memória Maestro Bernabé, de Barcelona e que vive no Brasil há mais ou menos 35 anos.

Estrela de Córdoba após fazer um autógrafo dedicado ao povo brasileiro, assim redigido: "Para o povo brasileiro todo o meu afeto", aquiesceu em informar à reportagem que nasceu no Distrito Federal do México, mas foi criada na Espanha; é jovem e jovial; é filha de mãe mexicana e de pai espanhol; foi em Madri, na emissora

local, que fez o seu aparecimento, como artista, publicamente; prefere cantar a música popular da terra de Cervantes; interpreta com muito sentimento "Las Mañanitas"; já visitou todo o Brasil e gostou muito, em Recife, de ver dançar o "frêvo"; seu espôso é húngaro; iniciou-se no Esperantismo com o nosso estimado confrade Zinner, em Madri; já teve ocasião de cantar na Rádio Jornal do Brasil, em homenagem ao povo brasileiro; conseguiu, durante a festividade, após cantar canções de Espanha e do México, interpretar, em ESPERANTO, magistralmente: "A Casinha Pequenininha" e o "Luar do Sertão".

Fala com relativa facilidade o português e assim nos entendemos, sem, entretanto, faltar-nos diálogos no idioma internacional-auxiliar-neutro (o ESPERANTO).

RIO ESPERANTISTA agradecendo, penhorado, a atenção que lhe dispensou Estrela de Córdoba, cumpri menta-a pelo êxito.

CONSULTOR FISCAL DE HIGIENE E SAUDE PUBLICA

Publicação especializada com circulação em todo o Território Nacional
Rio de Janeiro — Rua das Marrecas, 19-2.º — Lapa

Rio Esperantista

Orgão oficial da A E R J.

PENSAMENTO E TRABALHO PELA FRATERNIDADE UNIVERSAL

Diretor: Nelson Pereira de Souza

Redator-Chefe: László Zinner

Assinaturas:

Brasil — Cr\$ 25,00
Exterior — U\$ 1,50
Ou 15 Coupões-resposta
Avulso — Cr\$ 2,00

Rio de Janeiro, Janeiro de 1948

ANO II — Edição mensal — N.º 10

Enderço: Caixa Postal 3677

Redação e administração
Rua das Marrecas, 19, 2.º and
Telefone 22-5300

LASTAJ NOVAĴOJ

Troviĝas inter ni F-ino ANGA-
CI KNOLL nova esperantistino
el CANOINHAS (St. Santa Cata-
rina). Si estas koresponda ler-
nantino de S-ano Neves kaj pasi-
gas la libertempon en nia ĉefur-
bo. Bonvenon!

* * *

Aperis interesplena artikolo
pri Esperanto en la brazila kul-
tur-revuo "Letras", dank' al la
klopodo de S-ano Alberto Bon-
fim. ("Letras" unua jaro, n-
o 3-4, okt.-dec, 1947, 17-a paĝo.
Titolo "Lingua Internacional").

* * *

Pro la abdiko de la Prezidan-
to de Esperanto Klubo ĉe Kris-
tana Asocio de Junuloj oni unu-
voĉe elektis novan Prezidanton,
la ĝis nunan vic-prezidanton,
S-ron D-ron Alberto Bonfim. La
nova vic-prezidantino estas F-ino
Palmyra Meira de Vasconcellos.
Al ambaŭ ni elkore deziras suk-
ceson.

* * *

S-ano Nelson Pereira de Souza
forlasis la prezidantecon de Es-
peranto-Klubo ĉe Kristana Aso-
cio de Junuloj kaj la direktadon
de RIO ESPERANTISTA. La
motivo estas tute privata. El la
movado, la efika kunlaborado de
S-ano Nelson Pereira de Souza
ege mankas! Espereble li baldaŭ
revenos!

* * *

La ĉef-delegito de U.E.A. por
Brazilo, S-ro Antonio José Vaz,
faris grandan vojaĝon tra Ar-
gentino, Urugvaĵo kaj Ĉilo. Li
forvojaĝis je la 17-a de novembro
kaj venis la 22-an de decem-
bro, 1947. Denove li estas je la
dispono al la esperantistaro.

* * *

Okaze de la jarfino, nia Aso-
cio okazigis intiman feston en
sua ejo, straro Marrecas, oferan-

te dolĉaĵojn kaj trinkaĵojn al la
ĉeestantoj. Dum la festo nin ple-
zurigis S-ano Mauricio per bele-
gaj kantoj kiujn li mem akom-
panis kun gitaro. S-ano Sylla
Chaves deklamis Zamenhofajn
kaj siajn proprajn verkojn. Ma-
joro Milton Campello Nogueira
deklamis portugale kun grande-
ga sukceso. Fine S-ano Florestan
Nogueira deklamis poemojn
de Zamenhof. La feston lerte
organizis S-ino Cedilha Netto kaj
F-ino Elsa Travassos de Faria.
Ĉeestis 37 gesamideanoj. S-ro
Doblas Filho, tiama prezidanto
de Asocio, per simplaj sed sin-
ceraj vortoj dankis la ĉeeston de
la geasocianoj kaj gastoj.

* * *

Troviĝis inter ni S-ano Arnal-
do Vianna el São Paulo kiu li-
bertempis dum kelkaj semajnoj
en Rio de Janeiro.

* * *

Parfumfabriko "Esperanto".
S-ano José Francisco de Lima
starigis malgrandan laborejon
por fabriki parfumon. Li donis
la nomon al lia fabriko "Espe-
ranto" kiun oni oficiale enre-
gistris.

DONATIVOS

Registamos, com prazer, o
donativo feito pelo Sr. Oscar
de Menezes Pamplona, sócio
principal da firma proprie-
tária de "O DRAGÃO", da
rua Larga, ao nosso jornal.

Recebemos, também, da
Srta. Elza Travassos de Fa-
ria, uma caderneta com um
depósito bancário para a
Associação.

Aos doadores, aqui ficam
os nossos agradecimentos.

Efeméride Espe- rantista

Comemorando o 88.º ani-
versário de Zamenhof, a As-
sociação Esperantista do
Rio de Janeiro realizou, em
o salão nobre da Associação
Cristã de Moços, à rua Araújo
Porto Alegre, 36, no dia
13 de dezembro de 1947, uma
expressiva festa de arte.

Dirigiu a reunião o escul-
tor Laszlo Zinner convidan-
do, inicialmente, para for-
mar a mesa dos trabalhos, os
srs.: Ismael Gomes Braga,
representante da Liga Espe-
rantista Brasileira; A. Cae-
tano Coutinho, presidente
do Brazila Klubo "Esperan-
to"; Dr. Azeredo Coutinho,
presidente do Esperanta
Klubo "Azeredo Coutinho"
de Belo Horizonte; Octávio
Viana Peixoto, secretário do
Grupo Esperantista de Nite-
rói; Joaquim dos Santos
Gonçalves, presidente do
Grupo Esperantista de Ola-
ria; Dr. Alberto Bonfim, re-
presentando o Esperanta
Klubo da A. C. M.; e Fran-
cisco Doblas Filho, presi-
dente da Associação Espe-
rantista do Rio de Janeiro.

Em rápida nota, vamos
dizer o que foi a festividade
comemorativa do natalício
de Zamenhof:

Ismael Gomes Braga e
Délio Pereira de Souza, em
expressivos discursos, apre-
sentaram a personalidade
de Zamenhof em seu triplíce
aspecto: sábio, santo e após-
tolo.

Dr. Azeredo Coutinho dis-
se da necessidade do inter-
câmbio cultural dos espe-
rantistas do Rio com os das
outras cidades do território
brasileiro e, terminando, su-
geriu que os esperantistas
metropolitanos, sempre que

possível, passem suas férias
em Belo Horizonte ou em
qualquer outra cidade do in-
terior, contribuindo, assim,
para a maior expansão do
Esperanto no Brasil.

Octávio Viana Peixoto fa-
lou em nome dos esperantis-
tas de Niterói, sobre a data
de Zamenhof.

Cedilha Neto leu um tre-
cho do primeiro discurso de
Zamenhof, em primorosa
tradução de Yolanda de
Araújo Costa.

José Cosenza e Silla Cha-
ves declamaram diversas
poesias, em Esperanto.

Estrela de Córdoba, acom-
panhada ao piano por Alber-
to Bernabé, cantou várias
canções do folclore espanhol
e, por último, "A Casinha
Pequenina" e "Luar do Ser-
tão", do folclore brasileiro,
(em Esperanto).

Francisco Doblas Filho,
presidente da A.E.R.J.,
usou, a seguir, da palavra,
fazendo oportunos comentá-
rios sobre a alegre festiva-
de que, com a participação
de todos os esperantistas do
Distrito Federal, estava sen-
do realizada.

Encerrando a festividade,
Laszlo Zinner, diretor do De-
partamento Cultural da As-
sociação, agradeceu o com-
parecimento de todos os pre-
sentes, dos representantes
dos vários Grupos esperan-
tistas, bem como a represen-
tação da Liga Esperantista
Brasileira e da Associação
Cristã de Moços, que muito
vem prestigiando a causa do
Esperanto, e, terminando,
felicitou a artista Estrela de
Córdoba, simpatisante da
língua internacional-auxi-
liar, e que de maneira admi-
rável interpretou em Espe-
ranto "La Dometo" e "Lun-
lumo de l' Interlando".

Abonu

HEROLDO DE
ESPERANTO-n

La plej malnova kaj la plej
bona duonmonata gazeto.

Jarabono: Cr\$ 40,00

Peranto: — Brazila Ligo
Esperantista

Praça da República, 54

Rio de Janeiro